2021 – Ano VII – Volume VII – Número XXII ISSN – 2358-7482

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

# PRI LA NIGRULINA BELECO LAŬ ETIKA KAJ ESTETIKA PERSPEKTIVOJ

# ON BLACK BEAUTY FROM ETHICAL AND AESTHETIC PERSPECTIVES

# SOBRE A BELEZA NEGRA NAS PERSPECTIVAS ÉTICA E ESTÉTICA

Amanda Aparecida Salomão Lopes de Souza[46]

Edivaldo Simão de Freitas[47]

**Resumo**

Ĉi tiu artikolo esploras dekomence esploras la perceptojn, kiujn nigrulinoj havas pri sia rilato kun haroj, beleco kaj emancipiĝo, surbaze de bibliografiaj informoj, kies ĉefaj esploraj fontoj estis la nigraj feminismaj verkistinoj kaj gespecialistoj pri la temo en la jarcento XXI, kun malsamaj opinioj. Ni havas kiel bazon la teorian recenzon disvolvitan por la serĉo de komprenado pri la malkonstruado de normaligita kaj enradikiĝinta senkoloniigeca beleco, okazanta en iuj specifaj etnoj, kiuj ĝis tiam ne havis parol-lokon pri malrespekto de sia propra beleco. La neado pri la beleco antaŭ aliaj grupoj kaj la malatento al ilia memestimo estas diskutataj de nigrulinoj nuntempe danke al iuj agadoj: la propra fortiĝo ene de nigrulaj komunumoj, interhelpadoj kontraŭ malbonaj politikistoj kaj devigemaj sistemoj, ktp. Certe la rompo (kun la blankulaj reguloj kontraŭ la estetiko de nigrulinoj) alportis novan manieron observi la propran korpon al la nigrulinoj, estiganta politikan diskurson, kiu plifortiĝas. Estas do alvoko al virinoj partopreni politikajn agojn, kaj tiamaniere ili rompas la socie truditan reĝimon de beleco.

**Ŝlosilvortoj:** Nevidebleco de nigrulinoj. Beleco de la nigra virino. Estetiko de hararo. Nigrula enpoviĝo. Feminismo.

**Abstract**

This article explores, initially, the perceptions that black women have of their relationship with hair, beauty and emancipation, based on bibliographic information, whose main research sources were the black feminist writers and specialists on the subject of the XXI century, with different opinions on the subject. We are based on the theoretical review developed for the search for an understanding of the demolition of

[46] Graduação em Design de Moda (UTFPR), Especialização em Sociologia (FAVENE), Mestranda em Sociologia (UEM). Mogi das Cruzes-SP. ORCID: https://orcid.org/0000-0002-7877-8985. E-mail: amandalopesouza@gmail.com

[47] Graduação em Letras (UFC), em Filosofia (UFC), em Artes Visuais (UECE). Mestrado em Filosofia (UFC) e em Estudos da Tradução (UFC). Doutorando em Letras (UFC). Bolsista: FUNCAP. Fortaleza-CE. ORCID: https://orcid.org/0000-0002-6776-9426. E-mail: edyinaudivel@hotmail.com

normalized and entrenched decolonial beauty, occurring in some specific ethnic groups that until then had no place to talk about disrespecting their own beauty. The denial of beauty in front of other groups and the inattention to their self-esteem are being discussed by black women nowadays thanks to some activities. Certainly the rupture (with the whiteness rules against the aesthetics of black women) brought a new way of observing the black women's own body, turning it into a political discourse that is intensifying. That is, by invoking women to participate in political actions, in this way they break against a socially imposed regime of beauty.
**Keywords:** Invisibility of black women. Beauty of the black woman. Aesthetics of hair. Black empowerment. Feminism.

**Resumo**
Este artigo, inicialmente,  pesquisa as percepções que as mulheres negras têm de sua relação com o cabelo, a beleza e a emancipação, a partir de informações bibliográficas cujas principais fontes de pesquisa foram escritoras feministas negras e especialistas sobre o assunto no século XXI, com diferentes opiniões. Temos como base a revisão teórica desenvolvida para a busca de uma compreensão da desconstrução da beleza normalizada e arraigada da descolonização, ocorrendo em elguns grupos etnícos específicos que até então não tinham espaço para falar a resrespeito da própria beleza. A negação da beleza diante de outros grupos e a desatenção à sua autoestima estão sendo discutidas pelas mulheres negras hoje em dia, graças a algumas atividades: o autofortalecimento nas comunidades negras, ajuda mútua contra males políticos e sistemas coercitivos, e assim por diante. Certamente a ruptura (com as regras brancas contra a estética das mulheres negras) trouxe uma nova forma de observar o próprio corpo para as mulheres negras, dando origem a um discurso político que se intensifica. Há, portanto, um apelo para que as mulheres participem da ação política e, assim, possam romper contra o regime de beleza imposto socialmente.
**Palavras-chave:** Invisibilidade de mulheres negras. Beleza da mulher negra. Estética do cabelo. Empoderamento negro. Feminismo.

## 1. ENKONDUKO

> Tiel, ĉia demando reduktiĝas al tio: ĉu eblas al la homa menso domini tion, kion la homa menso kreis? (Nia traduko)
>
> Paul Valéry

Tiu ĉi teksto prezentas la estetikan konstruadon je identeca beleco de nigrulino kaj ŝian lukton por estetika memestimo. En la lastaj kvin-cent jaroj, la nigrula beleco estis nuligita de "diskretaj" provoj pri perforta blankigo, per rasmiksa politiko, por supoza "plibonigo" de rasoj; tiaj politikoj celas pulvorigi tian etnon en Brazilo, sed ne tiel okazis; kaj nuntempe ekaperis senĉesa reagostulformo en nigrula movado, ne nur

por la nigrula beleco, sed por ties akceptata ene de la propra nigrula socia medio, potencigante la statuson de korpo al politika-korpo kaj tiel iĝante agento, kiu ekestigas socian etnan/rasan amalgamon. La nigrulino ekrekonas sian parollokon kaj ekigas lukton por si mem.

Nia artikolo ekaperis el observadoj pri la nigrulino kaj ŝia pozicio en la nuntempa socio kaj ĉia ĝia konfronto socihistorie neglektata. La ĉefa punkto de ĉi tiu esplorado estas pri hararo kiel emancipiĝformo kaj tia nova belecnocio, kiu ekaperis en mallonga tempospaco, kompare kun tiom longa historio de neado; en tiu senco la hararo estas rimarkata kiel socikultura konstruadformo. Louro (2007, 2004), Queiroz (2000) kaj Fraga (2000) ratifikas la ideon, ke iel la hararo ion signifas, kaj tio varias inter la kulturoj. Iel en nuntempo, la individuoj evidentiĝas pro grandego de mesaĝoj el amaskomunikiloj, tiuj kiuj la beleco elstariĝas.

## 2. LA NOVA EKAPERO DE BELECO

Ekde ĝia unua kontakto, ĝis ĝia koloniiĝo fare de blankaj homoj, la nigrula fenotipo ĉiam estis konsiderata netaŭga la laŭ altniveloj de **centr**eŭrop**a** beleco, kio estis modelo antaŭdeterminita, tiam, por aprecado kaj altniveligado koncerne al tio, kio estas bela aŭ estetike aprecata kiel formparadigmo de alta beleco.

Pro ĝia uzurpita beleco (ni dirus ankaŭ: false ŝiminkita por ke kamufleblos iliaj karakteraj trajtoj) la nigra popolo bezonis pretekstojn, por plibone adekvatiĝi al socio. Tiaj evitadoj efikis senpere sur ĝian eksteraĵon kaj karakterizan estetikon: “Tio estadis necesa paŝo kaj por kontraŭbatali la negativecon jungitan al la identeco de femineco kun korporeco kaj por krei vidpunkton pli tutecan pri tio, kion signifas esti homo”. (FEDERICI, 2004, p. 15) (Nia traduko).

La nigrula socio, neeviteble, iĝis ostaĝo de ciklaj malvirtoj el estetikaj agadoj, kiuj ŝanĝas ne nur ĝian eksteraĵon, sed ankaŭ modifas sin mem kaj kaŭzas damaĝojn psikajn, kondutajn kaj akordigantajn kun aliula parolo instiganta al estetika blankiĝo, el kies socia normo, tamen, la nigrula socio devus urĝe deturni, por ke ĝi povu ilin elimini. De Paula (2014) ratifikas pri sekvanta ideo: la individuoj kontrolas la korpojn unuj de la aliaj, tiel ĉiu ajn devas adopti agadojn por sia propra korpo laŭ normoj el sia kulturo.





La beleco de nigrulino pasas tra malkonstruigada procezo ĉe kunigitaj mempercepto kaj reprezenteco, sukcesante apogon el amaskomunikiloj direktitaj al nigrula socio, kaj ankaŭ igadas tiun nigrulinon senti sin mem inkluzivigita kaj reprezentata, ĉar tiaj agoj gajnas novajn (re)signifojn, favore al nigra beleco. Tial, resignifi la belecon devigu reformojn en la maniero kaj kondutformo por celo, kelkfoje kontraŭemancipiĝa, ĉu politika, socia ĉu simple estetika, tamen tio ne nuligas percepton pri kulturo kaj lingvaĵo (semiotiko) por parolloko. Laŭ Davis, (2016) tiaj reformoj esteblas neeviteblaj, kulminantaj en novaj retenformoj. Observante tiun vidpunkton, la beleco, iun ajn paradigmon ni mencias, ekkreas novajn formojn, kiuj malliberigas la nigrulinojn, precipe nigregulinojn (tiaj kiaj estas pli malhelaj). Do, kiel ni jam menciis: ĉiam estos mensaj artifikoj por manipuli la homarojn per amaskomunikiloj kaj aliaj artifikaĵoj. Kaj tio estas farebla de iu ajn, ĉu politika, ĉu ekonomia kaj eĉ estetika, kiel ni jam asertis.

Gomes (2003) atestas, ke ia revalorigado ekstrapolas la individuon kaj atingas la etnan/rasan grupon, al kiu oni apartenas. La nigrulino rompendas kontraŭ tia sindromo el rasaj kastoj kaj rimarkendas sian rolon en la socio, kiel aktiva civitanino kaj scianta pri sia intelekta kaj beleca potencialo, intencante malkonstrui regadon super sia raso, kiu ŝajnas ĉesigita, sed revenas per “cikla movo” kun nova aranĝo, por plibone adekvatiĝi dum ĝia epoko kaj neceso. Tial ĉe tiu vidpunkto, oni memdiras: la lukto iĝendas je ĉiutaga movo kaj senĉese vigla, kvankam la konsekvencoj kaj alienigantaj artifikoj ankoraŭ longedaŭras pro malprogresemaj pensoj, kiuj la plejmulto ankoraŭ preferas akcepti, provcelante nuligi emancipiĝeblon de nigreco.

## 3. LA HARARO KAJ LA AKTIVISMO KIEL IDENTECA KONSTRUO

Hararo estas historio. Connell (2000) defendas, ke la korpo havas trajtojn de nia socia identeco, iel ĝi nin situigas kaj nin reprezentas en la socio, kaj tiel, la hararo, kiu estas parto de nia korpo aktivforme, estas ankaŭ parto de persona identeco de iu ajn individuo, ĝi rakontas historieron ne parolata pri ĉia ulo, ĉar okazas signifoplenaj ŝanĝoj dum la tempo, kaj en formo ĝin observi.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

La hararo ekposedas privilegiitan lokiĝon en sociebleco de virino, kaj por nigrulino tio estas eĉ vundebla pozicio, Andrade (2012) defendas, ke akceptado kaj valorigado de krispa hararo havas du etapojn, kiuj estas: (i) identiĝo, kaj (ii) etna-rasa atribuiĝo, kioj havas kvar staĝojn, “ilin dominas, submetiĝa staĝo, impresa staĝo, militada staĝo kaj la organizada staĝo”, malgrado

> Kunaj, rasismo kaj seksismo, nin subpremas ĉiutage per la amaskomunikiloj. Ĉiaj reklamaĵoj kaj ĉiutagaj scenoj nin komparas al la kondiĉon, ke ni ne estos belaj kaj altiraj, se ni ne ŝanĝos nin mem, precipe niajn harojn. Ni ne povas rezignacii, se ni scias, ke la blanka supereco informas kaj provas saboti niajn klopodojn konstrui individuecon kaj identecon, (HOOKS, 2005, p. 7). (Nia traduko)

La moderna mondo progresas per siaj teknologioj kaj kun ili aperas aliaj sistemoj de estetika endoktrinigo. La nigrulino rompis kontraŭ la malkrispigendo, aŭ varma kombilo, kio estas iom pli konata de pli maljunaj nigrulinoj, kaj travivis novan diktatoran sistemon: tiun de bukloj; tamen, kiu ne havas naturajn buklojn? Aŭ la hararo ne bukliĝas? Davis (2016) asertas, ke historie, kiam iu strebas krei reformojn, ili neeviteble kreas pli da subpremo.

> Kiel niaj prapatroj de la 19a jarcento, nur per aktiva rezisto ni postulas nian rajton aserti intelektan ĉeeston. La seksismo kaj rasismo laborantaj kune daŭrigas ikonografion de reprezentado pri la nigrulino, kio postlasas en la kolektiva kultura konscio la ideon, ke ŝi estas sur ĉi tiu planedo ĉefe por servi aliajn. (HOOKS, 2005, p. 468). (Nia traduko)

Forlasante la submetiĝeman rilaton, kiun la nigrulino havis kun sia koloniigisto – rilato, kiu estis struktura mem –, oni ĉerpas la figuron de la dominanta blankulo, do oni diskutas pri la bildo de la modela nigrulo, tial oni diskutas pri la politika korpo. Gomes (2006) asertas, ke la korpo kaj hararo estas lokitaj kiel spacoj de akceptado, malakceptado kaj resignifoplenado. Tiam, la kultura plureco (ankaŭ marĝenigita) de la nigrulo direkteblus al la emancipiga celo de ĉi tiuj diversaj elektoj en politika kaj socia sfero.

En la nigra etno estas io, kio eblas nomi rasajn kastojn, Gomes (2006) certigas, ke "la korpo kaj hararo rigardeblas kiel videblaj esprimoj de la lokado de subjektoj en



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

malsamaj sociaj kaj rasaj polusoj". Kaj kiam ni pli profunde analizas tiun ekzistantan (supozan) rasan kaston, kaj la lokon, kiun la nigra subjekto staras, precipe la nigrulino, oni konstatas, ke ŝi estas lokita en ian sub-rason. Laŭ Gomes (2006): "krispaj haroj kaj korpo povas esti konsiderataj esprimoj kaj simbolaj subtenoj de nigra identeco en Brazilo", tio estas, ĝi nomiĝendas nigrula beleco, tamen en etno, kiu jam estas konsiderata malsupera. Kun ŝia krispa hararo, ne buklaj (krispaĉaj laŭ iuj), kun ŝia malhela haŭtnuanco, larĝa nazo, dikaj lipoj kaj hiperseksigita korpo; ŝi iĝas malplimulto enigita en alian malplimulton. De Paula (2014) asertas, ke la korpo estas iom pli komprenata kiel socia kategorio.

Irante kontraŭ ĉia tia ideo pri rasismo kaj estetika normigado, Gregori (1993) asertas, ke ekzistis vanteco ĉe tiuj nigrulinoj, kiuj deziris malkrispigi sin. Tiam li ne konsentas pri la ideoj de la antaŭe menciitaj aŭtoroj. La kritikisto opinias, ke la nigrulinoj volemas krispigi sian hararon, ne oni necesis adekvatiĝi al socio, el kiu ili jam estis. Do, erara aserto por plejmultaj aŭtoroj, tamen tia pensado atestis ideon, ke nur en la lastaj dudek jaroj oni vere konsideris la opinion de nigrulinoj pri ilia beleco kaj ilia hararo. Wietz (2003a) disvolvas la ideon, ke virinoj estas same konsciaj pri kulturaj perspektivoj, rilate al siaj hararoj. Do, pli oftas diri, ke hodiaŭ la hararo ne nur estas parto de la identeco de la nigrulino, sed kiel ŝi memsituas en la socio.

> La hararo estas centra elemento en la vivo de virinoj. Ĝi estas, samtempe, esprimo de personaj kaj sociaj trajtoj. Personaj, tiel en la senco havi genetikajn determinoj kiel en la ebleco sin modifi laŭ individuaj preferoj. Sociaj ĉar, publike ekspoziciitaj, ĝi influas la perceptojn kaj sociajn rilatojn de tiuj, kiuj ekspozicias ĝin, kaj ĉar ĝi estas subordigita (aŭ ne) al iuj kulturaj determinoj —kiuj tre influas individuajn preferojn. (WEITZ, 2003). (Nia traduko)

La hararo iĝis speco de identeca pasporto, silenta sed potenca aktivismo; la aserto de socia ago – hararo estas nenio pli ol la krio diranta: "mi estas ĉi tie kaj mia opinio gravas". Laŭ Weitz (2003) malmulte gravas, kion virino faru per siaj hararo, se ŝi lasas ĝin natura, ĝin malkrispigas aŭ uzas teksaĵo sur sia kapo, sia hararo ja efikas sur la manieron, kiel aliaj homoj en socio reagas al ĝi, kaj ĝia influo estos pli granda aŭ eta, laŭ sia aspekto. Nu, laŭ la kompreno de Weitz (2003), la influo sur ĉiutagaj sociaj





agadoj havas grandan efikon sur la aspekto; kio povas signifi serion da aferoj, de la plej banalaj ĝis la plej kompleksaj plenumadoj.

Ne necesas malfermi la buŝon, ĉar hodiaŭ tiu hararo iras tra lokoj, kiuj eĉ antaŭe estis konsiderataj privilegiitaj. Laŭ Gomes (2003), tiu ĉeestanta revalorigado iras multe preter la individuo, ĝi atingas la etnan kolektivon, al kiu li kaj ŝi apartenas. Lastatempe, ĝuste antaŭ dek ses jaroj, Kalil (2005) en sia libro titolita *Chic,* en kiu ŝi destinas ĉapitron por paroli pri la estetiko de nigrulinoj, ŝi asertas, ke malkrispigi ne samsignifas kiel difekti hararon, ĉar hodiaŭ ekzistas produktoj kunmetitaj el pli malpeza formulaĵo kaj kaŭzantaj malmultajn damaĝojn al la hararo, ĝi ne ĝin streĉas, nek ĝin ŝajnigas kun difektitaj aspektoj, ĝi nur mildigas nigrajn harbuklojn. Tamen Silva & Braga (2015), en sia artikolo pri Harartransiro, asertas la sekvanta: "pri drastaj damaĝoj kaŭzitaj de la kemiaĵoj. Ja, per tiom da malstreĉiĝo tra la longaj jaroj, estis tempo, kiam mi preskaŭ kalviĝis pro sennombraj kemiaĵoj, kiujn miaj haroj havis". Do, en tiu kunteksto, tiu aserto kunportas du grandajn erarojn, (i) la aserto pri rasoj ekzistantaj kiel temo malmulte diskutata, kaj (ii) ke kemiaĵoj destinitaj por “malsovaĝigi” krispajn harojn ne kaŭzas damaĝon.

## 4. VIDEBLECO NE TRAFITA

Eblas aserti, ke – aŭtorinoj kiel Angela Davis kaj Bell Hooks certigas tion – la nigra beleco iĝis nevidebla laŭlonge de sia historio, dum ĝi estis troseksobjektigita, kun negativa plifortigo de dominaj stereotipoj, de troa elmontrado kaj seksismoj de dominanta blankularo. Federici (2004) disvolvas la penson, ke estas necese analizi la politikan korpon, kiu memhavas revolucian agon kaj alportas malsaman vidpunkton al nuntempa filozofio, aldonante novan resignifon al la korpo kaj al politikaj diskursoj. Tiel la nigrula korpo estas komprenata kiel identeca-politika korpo kaj kiel karcero por multaj, tial la lukto por nigraj feministoj estas tiel grava, dum ĝi estas malfacile komprenata, valorigata kaj ne stereotipata. Laŭ Coupland (1997), la korpo videbliĝas kiel dolorigo kaj suferigo, lokanta la virinon en la pozicion de viktimo. Kaj laŭ Moore (2012), ĉiuj havas tiun nocion pri socialigo bonpor la familio, ke rasismo estis ideologia konstruo, intelekta ellaborado por trafi ekonomian kaj politikan celon.

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

Eĉ se la nigrula korpo estas en evidenteco, ĝi ne akiras gravan statuson, do ne oni ĉesas ĝin sklavigi. Pruvo de tio estas la hiperseksigado de nigregaj, helnigraj aŭ mulataj virinoj (ĉi tiu lasta referenco estas konsiderata pejorativa nuntempe) kiel la "Globbelulino"[48], nigra kaj duonnuda virino, kiu sambas volupteme dum la karnavala periodo en nacia televidstacio aŭ aliaj cirkuladaj amas-komunikiloj.

> Iliaj muzoj estas belaj kaj dignaj, distanciĝantaj de la hiperseksigita stereotipo de la nigrulino, tre ĉeestanta en la imago de la periodo, kiel okazas en plejmultaj reprezentoj de la mulatino. Tiaj reprezentadoj pri mulatinoj aperas en diversaj kantoj ekde la 19-a jarcento kaj ankoraŭ cirkuladis en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj. (REIS, 2014, p. 2) (Nia traduko)

Nenigrulino neniam estis elmontrata en simila situacio, dismontrata al la tuta lando, por ke ŝi plaĉu al sia dominanto, kun sia ridetvizaĝo kaj devigata kredi, ke ŝia socia statuso estos ŝanĝita, sed la vero estas, ke ŝi daŭre estis sklavino al la voluptemo kaj al la deziro de la patriarkeco.

> Kaj la seksisma / rasisma okcidenta koncepto pri kiu kaj kio estas intelektulo eliminas la eblon memori pri nigrulinoj kiel reprezentantinoj de intelekta alvokiĝo. Fakte, en kapitalisma patriarkeco kun blanka supereco, ĉia kulturo funkcias por nei al virinoj la oportunon sekvi la mensan vivon kaj igas la intelektan proprecon malpermesita loko. (HOOKS, 2005, p. 468) (Nia traduko)

Hodiaŭ, la videbleco de nigrulinoj kaj ilia komunumo devenas de ilia pozicio rilate al ilia beleco, do la industrio ĉesis vidi ilin kiel man-laboristaron kaj ekobservas ilin kiel eblan potence konsumantan publikon. Laŭ Davis (2016), kiam nigrulinoj moviĝas, ili igas la tutan strukturon de la socio moviĝi kun ili. En videbleca rilatado de nigrulinoj, estas neeble ne paroli pri feminismo, ia ne tiom konata feminismo, kiu traktas pri temo, kun videbleco kaj fokuso por apogkaŭzi al nigrulinoj.

> Sed kun la edukado kaj distingo de virinoj, ni havos povon, kiu konsistas en tio, konduki la anglosaksan rason al supera kaj pli nobla vivo kaj, tiel, per la leĝo de altiro, levi ĉiujn rasojn al pli justa nivelo ol

[48] En Brazilo, ekzistas televidprogramo nomata "Globo".

IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

> tiu, kiun oni atingus en la politikizolada situacio de seksoj. (DAVIS, 2016, p. 90) (Nia traduko)

La feminismo, kiu estis antaŭe pledo nur de blankulinoj, akiris sian nigrulan version kaj kun ĝi alportis fenomenon de emancipiĝo por nigrulinoj, nomata enpoviĝo. Laŭ Federici (2004), ĝi estis nemalhavebla paŝo por la subpremo kontraŭbatali la negativecon ligitan al la identeco de virineco kaj korpeco. Por la kreado de vidpunkto, laŭ kiu oni plene komprenas kion signifas "homo", oni povas aserti, ke emancipiĝi rilatas al blankulinoj, kaj enpoviĝi al nigrulinoj. Surbaze de la tagordo de nigrula feminismo, la enpoviĝo temas pri la lukto por efektivafirmiĝo de nigrulinoj, kun la intenco konverti spacojn kaj instituciojn.

Simpla demando, kiu tre bone klarigas la punktojn de blanka feminismo: ĉu via feminismo ampleksas la kaŭzon de servistinoj? La respondo estas eĉ pli simpla, hodiaŭ la hejma laboro, en Brazilo kaj ĉirkaŭ la mondo, estas klara restaĵero de la jaroj de sklaveco en la lando. Laŭ Davis (2016), sklaveco estis moknomata "hejma institucio" kaj sklavinoj estis nomataj per la senofenda esprimo "hejmaj servistinoj",

> La vojo de savo por la emancipita amaso el nigra popolo ne plu trairas tra la kuireja pordo, kun ĝiaj grandaj salonoj kaj la verando subtenata per eksteraj pilieroj. Tiu vojo konsistas en tio, eskapi el hejma sklaveco, kiel ĉiuj nigruloj baldaŭ malkovris kaj scias. (DAVIS, 2016, p. 26) (Nia traduko)

Nuntempe la hejma laboro estas plenumata plejparte de nigraj kaj ekstercentraj inoj, kiuj forlasas siajn hejmojn kaj infanojn por prizorgi la domon kaj eduki la infanojn de aliaj. Laŭ Davis (2016), la percepto pri laboro en "hejmaj servadoj", de ekssklavposedantoj, estis ĝentila konduto por la malestima okupado, kiu ne estis tro malsimila al sklaveco, eĉ nek iomete

> Proporcie, nigrulinoj ĉiam laboris pli ekster la hejmo ol siaj blankaj fratinoj. La grandega spaco, kiun laboro okupas hodiaŭ en la vivo de nigrulinoj, reproduktas modelon starigitan dum la unuaj jaroj de sklaveco. Kiel sklavinoj, tiuj virinoj havis ĉiujn aliajn aspektojn en sia ekzisto nevidebligitajn de deviga laboro. (DAVIS, 2016. p. 26) (Nia traduko)





Tra la jaroj, nigrulinoj serĉis sian lokon en aliaj sektoroj, inkluzive en la akademio, kaj tio iĝis pozitiva plifortigo por ilia lukto kaj ilia videbleco, kiel pensantaj ulinoj kaj dotitaj per vasta intelekto.

> Sociekonomi-kultura konjunkturo antaŭenpuŝis la aperon de serio de eksplodoj de junularaj esprimoj meze de la 1960-aj jaroj kaj en la fruaj 70-aj jaroj. (...) La intenco estis ĉesi la subpremon spertitan en okcidentaj socioj, per neo al la imperio de scienca racio, al seksa subpremo, al kapitalismo, al militoj. (CIDREIRA, 2008, p. 35) (Nia traduko)

Vidigi ne estas trosentigi, ĉi tiuj estas tute malsamaj terminoj, kaj kun konotacioj kaj pezoj sen ia similo. La ĉefa paradokso observita: eĉ tra la jaroj, la nigra virina figuro ankoraŭ malavantaĝas rilate al aliaj individuoj, se oni tion observas laŭ iom simplisma, sed seksisma, rasisma kaj klasisma vidpunkto, la nigrulino daŭre okupas pozicion kiel sklavino, en nuntempa socia strukturo; paralele en la historio, tio oni ne povas nei: la struktura rasismo ekzistas kaj sukcesas estigi anakronismon ĉe du malproksimaj momentoj de la historio.

> Tio konstituas la regresan, anakronisman elementon en la historio de nacia kulturo. Sed ofte tiu sama reveno al la pasinteco kaŝas lukton por mobilizi la "homojn" por ke ili purigu siajn vicojn, por ke ili forpelu la "aliajn", kiuj minacas ilian identecon, kaj por ke ili prepariĝu por nova marŝo antaŭen. (HALL, 2006, p. 50) (Nia traduko)

## 5. LASTAJ KONSIDEROJ

Estas neserioze argumenti sen kompletaj pruvoj pri la situacio de nigrulinoj hodiaŭ, farante almenaŭ historian enketon pri la lastaj jaroj. Do, ne necesas paroli pri la situacio de nigrulinoj antaŭ 120 jaroj, ĉar vere videblas, ke malmulto ŝanĝiĝis, sed antaŭ iom pli ol dudek jaroj tiun ŝanĝon oni sentas kun pli granda forto. Tiam, la nigrulinoj komencis esti pritraktataj laŭ socia tagordo, ne nur en akademio, sed ankaŭ kiel aktivaj kaj influaj konsumantinoj en siaj propraj komunumoj.

La doktrino pri kemie traktataj haroj estis nuligita (almenaŭ per pli granda klareco), kaj la nigrulino ekvidas nature sin mem antaŭ sia spegulo kaj ekŝatas tion. Tio ĉesis esti unuopa, individua kaj aparta agado kaj ekfloris politika agado (same kiel soci-





kultura), kiel pozicia formo. Kaj eĉ se okazas signifajn ŝanĝojn en la vivo de nigrulinoj, oni rimarkis malfacilecon de la ne-nigrula popolo por akcepti tiun novan pozicion de virinoj en la socio.

Nuntempe, la nigrulino vidas sin ne nur kiel manlabora forto, sed kiel estaĵo dotita per libera pensado kaj intelekta potenco. Tiamaniere, la nigrula feminismo estas la granda potenciganto de tiu procezo, do ĝi lokis la nigrulinojn en la movado kaj ne nur fokusis ilian atenton sur iliaj doloroj. Do, Ili ankaŭ plene akceptis ilian kaŭzon, ŝanĝante siajn rolojn de viktimoj al aŭtorinoj de siaj propraj destinoj.

## 6. BIBLIOGRAFIO

ANDRADE, M. M. F. **Negritude em rede: discursos de identidade, conhecimento e militância – Um estudo de caso da comunidade NEGROS do Orkut (2004-2011).** (dissertação de Mestrado).139f. Programa de Pós graduação em Educação da Faculdade de Educação da Universidade de São Paulo - SP, 2012.

CIDREIRA, Renata Pitombo, A moda nos anos 60/70(comportamento, aparência e estilo). In**. *Revista* do *Centro de Artes, Humanidades e Letras*** *– Recôncavo - UFRB***,** *vol.* 2 (*1*)*, 2008.*

CONNELL, R. W. **The men and the boys. Berkeley**: California University Press, 2000.

DAVIS, Ângela. **Mulher, Raça e Classe.** São Paulo: Editora Boitempo, 2016**.**

DE PAULA. Rogéria Costas: **Corpo Negro – Midiatização e Performance de Raça.** III Simpósio nacional discurso, identidade e sociedade (III SIDIS) 2014.

FEDERICI, S. **Caliban and the Witch: Women, the Body and Primitive Accumulation.** Brooklyn, NY: Autonomedia, 2004.

FRAGA, A. B. **Corpo, identidade e bom-mocismo** – cotidiano de uma adolescência bem-comportada. Belo Horizonte: Autêntica, 2000.

GIDDENS. Anthony & SUTTON. Philip. W, **conceitos essenciais da sociologia, UNESP**. São Paulo 2012

GOMES, N. L. **Educação, identidade negra e formação de professores/as: um olhar sobre o corpo negro e o cabelo crespo.** Educação e Pesquisa, São Paulo, v.29, n.1, p. 167-182, jan./jun. 2003



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

_______, **Corpo e cabelo como símbolos da identidade negra.** Texto apresentado no II Seminário Internacional Educação Intercultural, Gêneros e Movimentos Sociais: identidade, diferença e mediações. Florianópolis, 8 a 11 de abril de 2003.

HALL, Stuart. **A identidade cultural na pós-modernidade.** 11ª ed. Rio de Janeiro: DP&A, 2006.

HOOKS, Bell. **Alisando nosso cabelos**. Revista Gazeta de Cuba – Unión de escritores y Artista de Cuba, janeiro-fevereiro de 2005.

KALIL, Glória. **Chic – um guia de moda e estilo para o século XXI**. Editora Senac: São Paulo, 2005.

LODY, R. G. da M. **Cabelos de Axé: Identidade e resistência.** Rio de Janeiro: Editora Senac Nacional, 2004.

LOURO, G. L. **Um corpo estranho** – ensaios sobre sexualidade e teoria queer. Belo Horizonte: Autêntica, 2004.

MOORE, Carlos. **Racismo e sociedade: novas bases epistemológicas para entender o racismo.** Belo Horizonte: Mazza Edições, 2007.

QUEIROZ, R. S. e OTTA, E. **A beleza em foco: condicionantes culturais e psicobiológicos na definição da estética corporal.** In: QUEIROZ, R. S. (Org.) **O corpo do brasileiro: estudos de estética e beleza.** São Paulo: SENAC, 2000.

REIS, Alexandre. **O "poder negro da beleza": A influência dos movimentos estadunidenses Black is Beautiful e Black Power na obra de Jorge Benjor.** In.: Anais do XI Encontro Internacional da Associação Nacional de Pesquisadores e Professores de História das Américas Niterói, Rio de Janeiro, RJ, 2014, 20 p. Disponível em: . Acessado em: 05 dez. 2018.

SANTANA, Bianca. **Mulher, cabelo e mídia.** Revista Communicare – Dossiê FeminismO. Volume 14 – Nº 1, 2014.

SILVA, Paula Camilla S. e BRAGA, Ângela Márcia da S. **Transição Capilar: O cabelo como instrumento de política e libertação através da identidade e suas influências.** Intercom – Sociedade Brasileira de Estudos Interdisciplinares da Comunicação XX Congresso de Ciências da Comunicação na Região Sudeste, Uberlândia-MG, 2015.



IΦ-*Sophia*

Revista eletrônica de investigação filosófica, científica e tecnológica

WEITZ, R. **Women and their hair: seeking power through resistance and accommodation.** In: WEITZ, R. The politics of women's bodies: sexuality, appearance, and behavior**.** New York, Oxfod University Press, 2003.

Recebido em: 04/08/2021
Aprovado em: 12/09/2021
Publicado em: 29/12/2021